



Saluton,

Nova jaro, nova vizittago en nia lernejo «La Grande Ourse». Ĉi-jare ĝi



okazos la 1an de junio 2013 kun



pedagogia

ekspozicio, manĝaĵet-eblo kaj

Maratono.

Pluse: ĉi-jare nia lernejo festos sian **30an naskiĝdaton!** Diversaj

programoj



atendas vin la tutan tagon, 10-18h!



La oficiala

parto



okazos je la 11a horo kaj la



maratono je

la 15a. Ĉar por mi tiu ĉi lernejo tre gravas (pro siaj valoroj kaj ankaŭ pro

la Esperanto-instruado, kiu estas ene de la normala studprogramo, ne kiel

postlerneja, elektebla ŝatokupo), do



ankaŭ mi kuros kun la

gelernantoj por nia lernejo. Por ke tiu

kurado

helpu la lernejon,



ĉiu kuronto

serĉas



subtenantojn.

Jen la kialo de la "Marathon-folio" en

tiu ĉi letero: mi serĉas miajn subtenantojn sendante ĝin al tiuj kelkaj

homoj, kiujn mi konas en Svislando. La subtenado povas esti unu certa

sumo, aŭ sumo/rondiro. Ne timu, 1 rondiro estas ĉ. 600m-ojn longa, kaj

dum 45 minutoj ĝis nun ĉiujare mi sukcesis finkuri nur 9-10 girojn. (...kaj

ja mi ne juniĝas... ☺) Ĉu vi bonvolus subteni min? Se vi konas personojn,

kiuj same volus/povus subteni min, ankaŭ ili estas bonvenaj!

Mi antaŭdankas viajn atenton kaj helpon!

Ĝis baldaŭ,

Mónika

eble la 1an de junio ĉe ni, en la Granda Ursino

La Chaux-de-Fonds, la 20an de majo 2013

Ps.: Mi sendas al vi ankaŭ la franclingvan invitilon. Se vi havas emon, eblon kaj tempon, venu vidi nin kaj nian lernejon!